BEL informas

n-ro 12/2016

la 27an de decembro 2016

27 de dezembro de 2016

53-a BKE okazos en Kuritibo

53º BKE acontecerá em Curitiba

La propono de Paranaa Esperanto-Asocio

A proposta da Associação de Esperanto do

akcepti la 53-an BKE estis aprobita en la decembra estrara kunveno. En Kuritibo nia movado kuniĝos en 2018. Laŭ decido de nia lasta Ĝenerala Asembleo ligi la periodon de niaj kongresoj al la tagoj ĉirkaŭ la feritago de Corpus Christi, ĝi okazos de la 31-a de maio ĝis la 3-a de junio 2018. Kuritibo jam gastigis 3 Brazilajn Kongresojn de Esperanto: 1954 – 14-a BKE, 07-14 de januaro; 1986 – 22-a BKE, 16-20 de julio; 1997 – 33-a BKE, 12-17 de julio.

Aliaj federitaj asocioj ankaŭ kandidatiĝis. BEL kore dankas tiom da intereso akcepti niajn BKE-ojn kaj jam komunikis tiujn asociojn, proponante engaĝigon por 2019. La kialo preferi Kuritibon por tiu venonta jaro estis trovi ekvilibron pri la okazigo de nia BKE laŭ la diversaj regionoj de nia lando: ekde 2006 nur 3 el 12 kongresurboj ne apartenas al la sudorienta aŭ centrokcidenta regionoj. Tial ni favoris okazigon por 2016 en la norda regiono (Manaŭso) kaj nun por 2018 en la suda. Kiel atendite, paralele okazos ankaŭ la 38-a BEJK. Ni certas, ke ili estos ĝuindaj kongresoj. Gratulon al PEA-PR!

BEL

Paraná de receber o 53º BKE foi aprovada em reunião da Diretoria Executiva de Dezembro. Em Curitiba o nosso movimento se reunirá em 2018. De acordo com a decisão da nossa última Assembleia Geral de ligar o período de nossos congressos aos dias em torno do feriado de Corpus Christi, o 53º BKE acontecerá de 31 de maio até 3 de junho 2018. Curitiba já recebeu 3 Congressos Brasileiros de Esperanto: 1954 – 14º BKE, 07-14 de janeiro; 1986 – 22º BKE, 16-20 de julho; 1997 – 33º BKE, 12-17 de julho.

Outras associações federadas também se candidataram. A BEL agradece de coração tanto interesse em hospedar nosso BKE e já comunicou isso, sugerindo nova candidatura para 2019. A razão para preferir Curitiba para 2018 é encontrar um equilíbrio para a promoção de nosso BKE, de acordo com as diversas regiões do nosso país: desde 2006, apenas 3 de 12 cidades-sede não pertencem às regiões Centro-Oeste ou Sudeste. Por isso preferimos para 2016 a região Norte e, agora, para 2018, no Sul. Como de praxe, paralelamente ocorrerá também o 38º BEJK. Temos certeza de que vão ser congressos incríveis. Parabéns à PEA-PR!

BEL

Historio kaj Kulturo: temo de niaj 52-a BKE/37-a BEJK

História e Cultura: tema do nossos 52º BKE / 37º BEJK

Estis elektita la temo de niaj 52-a BKE/37-a BEJK - **"Esperanto: lingvo kun historio kaj kulturo"**. La elekto de tiu temo spegulas la gravecon de la jaro 2017 por nia movado. Ĝi reprezentas 110 jarojn de BEL, 50-jarojn de BEJO, 100 jarojn post la morto de Zamenhof kaj fine 130 jarojn de nia lingvo Esperanto. Ĝi estas oportuna okazo por ke ni trastudu nian historion kaj celebru la kulturon ĉirkaŭ ĝi. Baldaŭ ni informos pri la maniero sendi viajn proponojn pri programeroj kaj eventoj por nia kongreso ĉirkaŭ tiu temo. Dume ne mistrafu la favoran aliĝperiodon ĝis la 31-a de Decembro. Aliru:

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/adesao.html

BEL

Foi escolhido o tema de nossos 52º BKE / 37º BEJK - **"Esperanto: língua com história e cultura"**. A escolha deste tema reflete a importância do ano de 2017 para o nosso movimento. Ela representa 110 anos de BEL, 50 anos de BEJO, 100 anos após a morte de Zamenhof e finalmente 130 anos de nossa língua, o esperanto. É um momento conveniente para que estudemos nossa história e celebremos a cultura desenvolvida em torno dela. Muito em breve vamos informar como enviar suas sugestões sobre programas e eventos para o nosso congresso em torno deste tema. Enquanto isso, não perca o período de adesão favorável até 31 de dezembro. Acesse:

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/adesao.html

BEL

Damas Cortejam: Esperanto-reklamo dum karnavalo

Damas Cortejam: divulgação do Esperanto no Carnaval

Kun granda ĝojo ni alportas bonan novaĵon por fermi ĉi tiun jaron: **BEL** iĝis unu el la sponsoroj de la karnavala bloko **Damas Cortejam**, de Fortalezo, Cearao. La grupo, formita nur de virinoj, sin prezentis la unuan fojon al Esperantujo dum la 70-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), marko de la debuto de Juliana Evandro, nuna prezidanto de BEJO, kiel kantisto de la grupo. La prezento estis granda sukceso!

Com muita alegria, trazemos uma boa notícia para fechar este ano: informamos que a **BEL** tornou-se uma das patrocinadoras do bloco **Damas Cortejam**, de Fortaleza. O grupo Damas Cortejam, formado só por mulheres, apresentou-se ao Esperantujo pela primeira vez no 70º Congresso Internacional da Juventude (IJK), marcando nesta data a estreia de Juliana Evandro, atual presidente da BEJO, como cantora do grupo. A apresentação foi um sucesso!

Lastasemajne **Damoj** lanĉis projekton por sia karnavala bloko pere de grupa financado:

Recentemente, as **Damas** lançaram seu projeto de bloco de carnaval por meio de financiamento coletivo:

https://www.catarse.me/damas_cortejam_bloco_feminista_ba57

https://www.catarse.me/damas_cortejam_bloco_feminista_ba57

Kaj tre mirinde almenaŭ 20% de la enspezoj venis de esperantistoj, multaj el ili eksterlandanoj, kiuj konis la grupon dum IJK. En unu el la donackategorioj la rekompenco estis anonco kiel sponsoro, kaj danke al donacantoj BEL povis fariĝi unu el tiuj sponsoroj. Kun granda fiero ni havos nian nomon de **Brazila Esperanto-Ligo** kaj de Esperanto mem anoncita de la bloko.

A surpresa é que pelo menos 20% do arrecadado veio de esperantistas, muitos dos quais estrangeiros, que conheceram o grupo no IJK. Em uma das categorias de doação, há a possibilidade de ser anunciado como patrocinador e, graças a doadores, a BEL pode ser tornar um desses patrocinadores. Com muito orgulho, teremos o nome da **Liga Brasileira de Esperanto** anunciado no dia

Estas unika ŝanco por disvastigo de BEL kaj Esperanto, ĉefe ĉar oni antaŭvidas, ke la nombro da ĉeestantoj superos 3 mil homojn. Sed tiu disvastigo ne okazas nur ĉe la publiko: la artistoj laborantaj ĉirkaŭ la grupo pli kaj pli konsciiĝas pri la graveco kaj forto de Esperanto kaj nia komunumo en la sfero de kulturo.

do bloco. É uma oportunidade única de divulgação da BEL e do Esperanto, uma vez que a previsão de presentes no dia bloco seja superior a 3 mil pessoas. Mas esta divulgação não ocorre apenas no público: artistas que trabalham em torno do grupo começam cada vez mais a criar consciência da importância e força do Esperanto e de nossa comunidade na esfera da cultura.

Ekzemplo de ĉi tiu ligo estas, ke Karlo Kardozo, Sekretario pri Homaj Rajtoj de la Urbodomo de Fortalezo kaj ankaŭ esperantisto, invitis **Damojn** pridiskuti la subtenon de la Urbodomo por iliaj agoj, kaj akcpetis la grupon parolante al ili en Esperanto. Por fermi per oro, **Damoj** kunludos sur la Placo de Benfica, kie estas la busto de Zamenhof, en Fortalezo. Hura!

BEL

Um exemplo desta liga é que Karlo Kardozo, Secretário de Direitos Humanos da Prefeitura de Fortaleza e também esperantista, convidou as **Damas** para tratar do apoio da Prefeitura para estas ações e as recebeu falando em Esperanto. Para fechar com chave de ouro, as **Damas** cortejarão na Praça do Benfica, onde fica o busto de Zamenhof, em Fortaleza. Viva!

BEL

Feliĉan 2017! Ni restu kune!

Feliz 2017! Continuemos juntos!

Em 2017 restu kune kun BEL kaj BEJO:

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/adesao.html

BEL/BEJO

Em 2017, continue com a BEL e com a BEJO:

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/adesao.html

BEL/BEJO

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Esperanto para principiantes

Descubra em sua BEL@Butiko

Por la mondo

Nova edição do famoso curso de Aloísio Sartorato, ricamente ilustrado e com opção de se baixar o áudio em MP3. Compre, aprenda, estude, presenteie. Apenas R$ 30,00. Confira em:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/esperanto-para-principiantes.html

BEL Informas/BEL@Butiko

CD “Por la mondo”, da banda Merlin, com grandes canções como “Por la mondo”, “Estas la leĝo”, “Estis unu fojo”, “Bluaj fragoj”, “Mia vojo”, “Mi kredas”, “En ĉi tiu momento”, “Pri la vero”, “Elprovo”. Compre agora este ótimo disco:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/por-la-mondo.html

BEL Informas/BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Eduardo Silva, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva informilo de BEL kaj BEJO sendante novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim bilíngue da BEL e da BEJO, enviando novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel/index.htm